

Foto-ekspozicio en Centro Ludoviko Zamenhof

Zamenhof sur vitraj platetoj de antaŭ pli ol cent jaroj

En la tagoj 11-18 de aŭgusto 1912, en la 25-a datreveno de publikigo de la Unua Libro, en Krakovo oni organizis la 8-an Universalan Kongreson. La solenadon komencis akcepto en la Malnova Teatro organizita de la urbaj aŭtoritatoj. En la sekvantaj tagoj la partoprenantoj laboris en diversaj sekcioj, vizitis la salminejon de Wieliczka, metis flo-rojn ĉe la monumentoj al Adam Mickiewicz kaj Mikotaĵ Koper-nik. En la fino denove okazis balo en la Malnova Teatro, al kiu iuj partoprenantoj venis en naciaj kostumoj.

Mi estos nur inter vi

Kiel la unua kongreso organi-zita sur la pola teritorio ĝi mon-triĝis manifestacio de la pola kul-turo, dum ĝi oni ia. prezentis la operon Halka de Stanisław Mo-niuszko kaj la dramon Mazepa de

Juliusz Stowacki. La krakova kongreso distingiĝis ankaŭ per tio, ke dum ĝi Ludoviko Zamenhof rezignis la ĉefan rolon en la Esperanto-movado, dirante la fa-majn vortojn: La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur inter vi.

En ĝi partoprenis ĉ. 1000 ho-moj el 30 landoj, interalie granda grupo de esperantistoj el Britio, en kiu estis ia. kolonelo John Pol-len, Richard Sharpe kaj John Ma-bon Warden. La lasta, skota esperantisto, unu el la aŭtoroj de kelkfoje reeldata angla-Espe-ranta vortaro (1915), kaj la ĉefa redaktoro de Esperanta Biblio (1926), faris serion de fotoj-me-moraĵoj prezentantaj la par-toprenantojn, Ludovikon Za-menhof mem, sed ankaŭ bildojn de la urbo kaj ĝiaj loĝantoj, ekz.

krakovaj bazaristinoj, kiuj por la brita esperantisto devis prezen-tiĝi kiel loka folkloro. En la serio troviĝas ankaŭ aliaj bildoj de la komuna fotado de esperantistoj, farita ĉe la monumento al Adam Mickiewicz kaj sur monteto apud la tumulto de Kościuszko. En la kolekto estas ankaŭ lumbildo fa-rita dum la Universala Kongreso en Antverpeno, kiu okazis unu jaron pli frue (1911). Ĉi tie vide-blas vikle gestanta Ludoviko Za-menhof konversacianta kun svisa esperantisto kaj lia posta biografisto Edmond Privat.

Heliografaĵoj de Warden

La fotoj konserviĝis en la for-mo de dekkelkaj vitraj platetoj – heliografaĵoj (temas pri unu el noblaj teknikoj en fotografio, su-fiĉe populara komence de la 20-a jarcento; ĝis la nuntempo konserviĝis tamen malmultaj fo-



toj faritaj en tiu tekniko). Ni ne konas la historion de la kolekto, ni povas nur supozi, ke temas pri parto de pli granda kolekto de dokumentoj, farataj de Warden dum grandaj kaj etaj renkontiĝoj de esperantistoj. Dum cent jaroj la vitraj negativoj kuŝis en origi-nalaj skatoloj, por atingi nin kiel donaco de la brita esperantisto Bill Chapman pere de Instituto de Pola Kulturo en Londono.

Ekde la 13-a de decembro de la kuranta jaro grandforma-tajn presajojn de la fotoj oni po-vos rigardi en Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko kiel no-van ekspozicion.

(Foto: BOK,
teksto: A. Kajdanowska)

La Fon-dumo kiel in-stitucio por krei la Mon-dan Esperan-to-Centron en Bjalistoko estis establi-ta per notaria akto la 21-an de decembro 1987 fare de la fondo-grupo: Roman Dobryński – prezidanto de la ĉefa estraro de Pola Esperanto-Asocio, Józef Jaworski – prezidanto de Bjalistoka Kultur-Societo, Jarosław Parzyszek – re-prezentanto de Asocio de Polaj Studentoj, Ewa Siurawska – direk-toro de la oficejo de la ĉefa estra-ro de Pola Esperanto-Asocio, Jer-zy Slezak – vojevodo de la bjalistoka provinco, Zbigniew Zdrojewski – urbestro de Bjalisto-ko. La statuto de la Fondumo estis akceptita la 26-an de majo 1988 per decido de prof. Aleksander Krawczuk en la nomo de la mini-sterio pri kulturo kaj arto, kiu fa-rigis ĝia laŭleĝa kontrolanto.

Solena fondo de Fondumo Za-menhof okazis la 4-an de junio 1988 en la salono de trezorejo en la reĝa kastelo en Varsovio kun ĉeesto de la prezidanto de Sejmo, aŭtoritatoj de la provinco kaj la urbo Bjalistoko, la ministro pri kulturo kaj arto kaj multaj kunve-nintaj esperantistoj.



32 jaroj de Fondumo Zamenhof

Neuzita ŝanco

Komence la ĉefa celo de la Fondumo estis konstrui en Bjali-stoko la Mondan Esperanto-Cen-tron. Oni anoncis konkurson por arkitektura projekto de la Centro kaj post ĝia resumo la plej bonajn verkojn oni prezentis en 1989 dum Universala Kongreso en Braj-tono ĉe la bjalistoka budo. La Monda Esperanto-Centro estis konsistonta el Esperanto-bibliote-ko, muzeo, kulturcentro, granda spektaklejo, centro pri instruado de fremdaj lingvoj, telekomunika centro, amfiteatro kaj internacia parko.

En la unua periodo de la funkciado de la Fondumo regule okazis kunsidoj, en kiuj oni pri-pensis eblojn realigi la ambician planon. Oni serĉis sponsorojn, investantojn kaj la sidejon por la Fondumo kaj Bjalistoka Espe-ranto-Societo. Malgraŭ ekster-ordinara aktiveco kaj engaĝiĝo de ĉiuj membroj de la Fondumo, ŝanĝoj okazantaj en la politiko kaj ekonomio de Pollando male-bligis la realigon de la grandioza plano.

Novaj celoj

En decembro 2019 pasos 32 jaroj de la funkciado de la Fon-dumo. En tiu tempo okazis mul-to bona, sed estis ankaŭ malpli prosperaj jaroj. Ŝanĝiĝis la estra-roj, ŝanĝiĝis la konsisto de la konsilio de la Fondumo, sed ne eblas listigi ĉiujn atingojn, kiujn oni sukcesis. Estis (kaj estas!) la Medalo de Toleremo enmanigita al la papo Johano Paŭlo la 2-a, estis aŭkcioj en Universalaj Kon-gresoj, estis internaciaj renkon-tiĝoj, ekz. en Brajtono kaj Biało-wieża, okazis ankaŭ diskutoj pri la estonteco de la Fondumo kaj taskoj, kiujn ĝi plu havas.

Nun, kiel ni legas en la statu-to (Ĉapitro 2. Celoj kaj reguloj de la agado de la Fondumo) – La celo de la Fondumo estas: 1) krei la Mondan Esperanto-Cen-tron Ludoviko Zamenhof en Bja-listoko – monumenton omaĝe al la kreinto de la internacia lingvo Esperanto, kiu plenumos funk-ciojn de studejo kaj diskonigejo de la lingvo Esperanto kaj de in-ternacia interŝanĝo scienca kaj

kultura. 2) popularigi kaj subteni agadon helpantan al firmigo de la paco en la mondo kaj de kompreniĝo inter popoloj kaj homoj nome de la idealoj, kiuj estis la bazo ĉe la naskiĝo de la interna-cia lingvo Esperanto.

Fondumo Zamenhof posedas sian propran sidejon ĉe la strato Piękna 3 en Bjalistoko, kaj pli pri ĝia agado oni povas legi ĉe la retpaĝo www.fondumozamenhof.pl

La 29-an de julio 1987 ĉirkaŭ mil partoprenantoj de la 72-a Uni-versala Kongreso en Varsovio iris al Bjalistoko kaj ĉe la monumento al Ludoviko Zamenhof ĉeestis ce-remonian subskribadon de la fon-doakto de la Monda Esperanto-Centro. La dokumenton subskribis: la prezidanto de Sejmo Roman Malinowski, la prezidanto de UEA Humphrey Tonkin, la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio Roman Dobrzyński, la urbestro de Bjalistoko Jerzy Zdrojewski, la vojevodo de la bjalistoka provinco Wiktor Slezak, la prezidanto de Bjalistoka Kultur-Societo Jerzy Ja-worski.